

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

Ni detale priskribis la atmosferon, kiu regis en Svislando antaŭ 1847. Vi rimarkis, ke ĝi tre similis al tiu, kiu regas hodiaŭ en la internacia mondo.

A.- La alfrontado de du ideologioj rapide kondukis al kreskantaj miskomprenoj. Fine paca kunekzistado inter la konservativuloj kaj la radikalaj revoluciuloj ŝajnis en ambaŭ kampoj neebla. Tiam okazaĵoj, kiuj apenaŭ estus rimarkeblaj en paca tempo, vekis senfinajn interkantonaĵajn disputojn.

Cl.- Ĉiu kantona registaro provis influi sian publikan opinion. Ĉar tiu publika opinio estis dividita en du politikaj tendencoj, tiam estis necese krei unuanimecon per nepolitika rimedo. La registaroj tiam renaskigis malnovajn religiajn malamojn.

A.- En iu momento oni ricevis la impreson, ke Svislando revenis al la epoko de la religiaj militoj.

Cl.- Tamen la kaŭzoj de la disputemo restis politikaj. La sekreta pakto nomata **Sonderbund** [aparta ligo] celis ebligi al sep registaroj konservativaj sin defendi kontraŭ la radikala revolucio. Kiam en somero 1846 la ekzisto de tiu pakto estis oficiale malkovrita, tiam estis neeble al la sonderbundaj kantonoj kredigi alian celon.

A.- Defendo kontraŭ la radikala subversio estis pravigo senvalora por la publika opinio. Tiam la sonderbundaj registaroj trovis nenian advokaton por defendi sian kaŭzon antaŭ la svisa popolo.

Cl.- La publika opinio ĉiam facile pardonas al revoluciuloj atencojn kontraŭ la leĝoj. Sed tiu publika opinio ne pardonas al registaroj, kiuj sin proklamas la defendantojn de la leĝoj, atencojn kontraŭ la leĝoj mem. Pro tio simpatio al la radikalistoj kaj malŝatego al la sonderbundaj konservativemaj registaroj kreskadis monaton post monato.

A.- Tiu simpatio al la radikalaj revoluciuloj esprimiĝis dum sinsekvo da kantonaj balotoj. Ĉiam la radikala tendenco venkis super la konservativa. Unu jaron post la malkovro de la sonderbunda pakto jam ekzistis pro tio radikala plimulto en la konfederacia Dieto.

Cl.- Por la unua fojo tiu senpova Dieto pro tio ekposedis voĉan plimulton. Ĝi kunsidis en julio 1847 en la urbo Berno. Ĝin malfermante la prezidanto de la berna registaro en tre digna parolado alvokis la registarajn delegitojn al repaciĝo. Tiu alvoko restis vana.

A.- La sonderbundaj registaroj rifuzis ĉian arbitradon. Tiam la Dieto proklamis la apartan pakton Sonderbund kontraŭa al la konfederacia Pakto de 1815. La sonderbunda pakto estis proklamita malfondita.

Cl.- Tiu Dieta decido estis leĝa. Tamen la sonderbundaj registaroj rifuzis ĝin obei.

A.- La Dieta kunsido estis interrompita dum du monatoj por doni tempon al la sonderbundaj registaroj reveni al politiko pli konforma al la Dieta decido. Sed la sonderbundaj registaroj rifuzis revizii sian politikon.

Cl.- Tiam la Dieto decidis varbi konfederacian armeon kvindek milsoldatan. La ĝeneva kolonelo Henri Dufour estis elektita generalo.

A.- En la Dieto Bernhard Meyer, reprezentanto de la sonderbunda tendenco, legis proklamon. Li havis larmojn en la okuloj. Levante la brakojn ĉielen kaj prenante Dion kiel atestanton, li avertis, ke se okazos interkantona milito, tiam la sonderbundaj kantonoj neniel kulpos.

Svisa federismo, 7-a parto
Claude Gacond, 159-a radioprelego, 1966.10.26 & 1966.10.29

Cl.- Post tiu solena averto la sonderbundaj delegitoj forlasis la Dietan kunsidejon.

A.- La postan semajnon la sonderbunda armeo komencis ataki du kantonojn Aargau kaj Tiĉino. Tial la 4-an de novembro 1847 la Dieto ordonis al generalo Henri Dufour perforte obeigi la sonderbundajn registarojn.

Cl.- Antaŭ ol ekagi generalo Henri Dufour faris solenan proklamon, en kiu li admonas la soldatojn eviti ĉian absolute ne necesan perforton. Tiu rekomendo antaŭsignas la baldaŭan fondon de la Ruĝa Kruco, al kiu kontribuos generalo Henri Dufour kun Henri Dunant. Aŭdu kelkajn frazojn de la solena proklamo :

*A.- « Mi metas sub vian protektadon la infanojn, virinojn, oldulojn kaj pastrojn.
Kiu atakas nearmitan personon, tiu malhonorigas kaj makulas sian flagon.
La militkaptitoj kaj vunditoj meritas viajn respektemon kaj kompaton. »*

Cl.- Generalo Henri Dufour konsciis, ke ĉiu mortigo necese vekas venĝemon, kaj ke la starigo de nova federacia konstitucio ne povos sin bazi sur perforto kaj venĝemo, sed sur repaciĝo.

A.- Pro tio li evitis la alfrontadon kun la malamika armeo kaj estis tre severa kontraŭ la subuloj, kiuj estis senpaciencaj ataki la malamikon. Li volis kontroli ĉian kampanjon kaj konsideris sian agadon pli kiel polican agadon, ol kiel militan konkeron.

Cl.- Dank'al tiu taktiko la sonderbunda milito finiĝis jam post unu monato. Ĝi estis kaŭzinta entute nur 104 mortintojn kaj 374 vunditojn.

A.- Nun Svislando estas matura por reala federacia vivo.

Cl.- Karaj aŭdantoj, antaŭ ol adiaŭi vin, ni atentigas vin, ke en la nova vintra programo, kiu komenciĝos en la dua semajno de novembro, niaj vesperaj elsendoj jaŭde kaj sabate ne plu komenciĝos je la 22-a horo 15 minutoj, sed duonan horon poste, nome je la 22-a horo 45 minutoj. Bonvolu noti tion.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon !

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-